# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:39; oktobro 29.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen. Sume 300 KB


## Lagrange en Litovio sekvajare

*La Ondo de Esperanto* komencas prezenti tiujn, kiuj grave kontribuos al la programo de BET-59, kiu okazos ekde la 5-a de julio 2025 en Kaŭno (Litovio). La unua prezentanto estas **Arno Lagrange** el Francio, kiu en Kaŭno prelegos pri Stefan Zweig kaj prezentos la solspektaklon "La ŝaknovelo" laŭ la samtitola ĉefverko de Zweig. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/bet-149/

## Forpaso en Tanzanio

Forpasis sinjoro Wistone E. Mahetane dum la Kongreso en Aruŝo. Ni havis valorajn momentojn kune dum la UnK kaj lia bonkoreco kaj sindonemo restos en mia menso.

Honoré Sebuhoro. Kongo DR

## Auld lang syne – tradicia skotdevena adiaŭa kanto

La 6-an de novembro 2024 en la Nacia Biblioteko de Skotlando (Edinburgo) Esperanto-Asocio de Britio okazigos ceremonion omaĝe al la centjariĝo de William Auld (1924-2006) – eminenta skota esperantista poeto, tradukisto, eseisto, redaktoro, prezidanto de la Akademio de Esperanto. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/auld-3/

## Volontuloj en Ĉinio agas per Esperanto

Septembre Ĉina Asocio de Volontuloj (ĈAV) invitis Liaoning-an Esperanto-kulturan Klubon (LEKK) fari por la publika bonfarta klaso la retan (Vi-ĉato) Eo-instruadon ĝis la 17-a de decembro 2024. Tio estas rezulto post la 5-a Liaoning-a Recitado de Esperantaj Poemoj organizita de LEKK en julio. S-ro Liu Weijie, fondinto de la klubo, plenumos tiun ĉi taskon. Nun li estas instruanta Esperanton en la 10-a reta Esperanto-kurso kun 110 aliĝintoj.

ĈAV (https://www.chinava.net) estas bonfara nacia socia grupo komune iniciatita de Ministrio pri Civilaj Aferoj, la Civila Oficejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Virina Federacio, la Ĉina Federacio de Sindikatoj, la eksa Ministerio pri Edukado, la Komunista Junulara Ligo de Ĉinio, la Ĉina Ruĝa Kruco kaj Ministerio pri Sano. Nun ĝi havas 1.87 cent milionojn da volontuloj kaj 772 milojn da volontulaj grupoj.

Na klubo invitite eniras en la organizan komitaton de planate granda ekspozicio pri kulturoj. Ĉi tio rezultas el prizorgoj kaj subtenoj de e-istoj kaj Eo-organizaĵoj, kaj el neesperantaj amikoj kaj grupoj. Ni kore dankas ilin.

Wu Guojiang, Prezidanto de LEKK ghemelurboj@sina.cn ghemelurboj1@sina.com

## Burundaj Donacoj per Esperanto

Mi prezidis la donacon de lernejaj uniformoj kaj kajeroj al indiĝenaj infanoj de la etno Twa en la komunumo Nyabihanga. La lernejo al kiu ni donacis la materialojn nomiĝas *Girimbazil Tujane* (Estu kompatema. Ni iru kune). La lernejo havas 200 infanojn. Ili bonvenigis nin per kantoj. Tiu ĉi donaco venis per monkolektaj kampanjoj inter burundaj kaj eksterlandaj esperantistoj specife Mireille Grosjean. La komunumo reprezentas 2% de la burunda loĝantaro, sed ili estas malriĉaj kaj meritas subtenon. La Ministro de Solidareco kaj Homaj Rajtoj dankis la burundan esperantistaron pro tiu ĉi gesto. Ŝi petis, ke ni organizu Eo-trejnadon por instruistoj, ĉar ŝi trovis, ke la lingvo Esperanto estas lingvo de paco, unueco kaj amo.



**Manirakiza Aimé Patrick, Burundo**

## Ĉina jubileo

La 1-a de oktobro estas la 75-jara jubileo de fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kaj ni bondeziras al vi kaj via lando prosperon kaj feliĉon! Ni tre admiras la amikecon inter ni starigita per Esperanto kaj esperas, ke ni profundigos tiun amikecon kaj i ke ni havu pli intimajn rilaton kaj kunlaboron! (https://www.chinaesperantoligo.com.cn/ )

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: TORPEDo-19 kun kurso
Gvidantonomo: Zsófia Kóródy, Peter Zilvar, Martin Ptasinski
Loko: Herzberg am Harz, Germanio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27665

Nomo: Zaozhuang-a Universitato
Gvidantonomo kaj aldoninto: Alessandra Madella
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Zaozhuang, Ĉinio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27659

Nomo: Online-Esperanto-Kurs für Anfänger ab 10.09.2024
Gvidantonomo: Heinz-Wilhelm Sprick. Aldoninto: hipopotamo
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Hessisch Oldendorf, Germanio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=2766

Nomo: Université de Tours
Gvidantonomo kaj aldoninto: Philippe PLANCHON
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Tours, Francio.
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27656

## Ĉiu alportu sian brik(s)on!

Pri BRICS/BRIKOJ <Esperanto-en-briksaj-landoj@groups.io> mi opinias ĝian fondiĝon kun celo ekonomia, ne politika. Ni esperantistoj ne kapablas influi ĝian lingvan politikon, sed ni deziras doni nian lingvan servon, kiel ni deziras doni nian servon al iu ajn organizo internacia en la mondo, ĉar Esperanto estas neŭtrala lingvo por la homaro. Pro tio mi proponas al IKEF-anoj loĝantaj en BRIKSOJ, aliĝi al la retgrupo <Esperanto-en-briksaj-landoj@groups.io>, se ili deziras. Dankon!

En septembro Emilio Cid, prelegis pri BRICS, dum la ŝtata kongreso de San-Paŭlo. Entute estis 634 kongresanoj https://easp.org.br/asocio/paulinia2024/

Ĉeestis influaj membroj de la brazila movado kaj inter ili Adonis Saliba, la teamo de EASP, James Piton, komitatano B, kaj Fernando Maia - vicprezidanto de UEA.

Pluraj esperantistoj kontraŭas la agadon por BRICS ĉar estas en la grupo kelkaj diktatorecaj landoj kaj ankaŭ pro tio, ke Ĉinio estas komunisma lando. Mi klarigis, ke BRICS ne estas politika grupo, sed komerca grupo kaj ke la plej granda komerca partnero de Ĉinio estas Usono. Ĉeestantoj konsentis, ke vera esperantisto ne havu antaŭjuĝon kontraŭ iu ajn lando pro la stato de ĝia registaro. Ni estas esperantistoj kaj akceptas homojn el ĉiuj landoj. Jen nia paĝaro https://brics-esperanto.org/eo/

Emilio Cid, Brazilo kaj Ĉielismo, Ĉinio.

## Aikido – piedfrapo por la paco

Ĉirkaŭ la internacia pactago de UN, ni festas la *Aikido Semajnon de la Paco.* Fondis kaj stimulis la iniciaton mia amiko, la forpasinta, altestimata Aikido-majstro Bertam Wohak el Munkeno, Germanio, kaj same majstro Paul Linden el Usono. Grava celo estas montri la pac-krean forton de Aikido al la publiko: demonstri la arton, ekspliki la sintenon de la praktikantoj pri paco kaj kiamaniere Aikido efikas kaj apogas pacon. La Aikido-praktikantoj de mia praktikejo (*doĵo*) ĝuste en la pactago, montros Aikidon al la vizitantoj de somera kulturfestivalo en nia urbo Trier, Germanio (Minna no matsuri: https://matsuri-trier.de/programm/). Bv. viziti la retejon de nia projekto Aikido kaj Esperanto: http://esperanto-aiki.de/o/eo/. Kadre de intervjuo pri Aikido, mi ne hezitos mencii Esperanton kiel manieron apogi pacon ankaŭ.

Christoph Klawe

## Cicio Mar iris al Afriko

CED surretigis mian prelegon pri la ĉina samideana verkisto Cicio Mar dum la Esperantologia Konferenco de Aruŝo. Pro interesa kazo de la vivo, li estis tre

proksima de Bloomsbury (Vanessa Bell, Virginia Woolf ktp). Intertempe mi malkovris freŝajn informojn. Sed bonan spektadon, se vi interesiĝas!
Cicio Mar kaj la angla-lingvaj literaturaj medioj en la jaroj 1930-40. Prelego de Alessandra Madella

Alessandra Madella

## Togolanda varbado

En la publika universitato de Lomeo, s-ino Judith Massan parolis pri nia lingvo al la gejunuloj, kiujn ŝi renkontis. Ŝi kunportis kalendarojn kaj flugfoliojn, kiujn ŝi disdonis, klarigis pri nia lingvo kaj respondis demandojn. Inter la studentoj, iuj montris intereson pri Esperanto kaj konsentis doni siajn kontaktojn por posta rilato. Laboro estas farata cele al enmovadigo de la renkontintaj universitatanoj. Adje Adjevi

## Elpaŝo pri Esperanto en Kuba Universitato

Nia instruisto Julián Hernández partoprenis prezenton pri Esperanto kaj ĝiaj ĉefaj profesiaj profiloj en la Fakultato pri Artoj kaj Literaturo de Havano, kiu dediĉas sin al la instruado de Artoj, lingvstiko kaj literaturo. Ni estis invititaj de instruistoj de tiu fakultato por prezenti Esperanton kadre de leciono de la fako Aplikata Llingvístiko, bonega okazo por fulme prezenti la gramatikan bazon de la lingvo. La teamo de la fakultato restis impresita de la prezento, montris sin malfermaj al pliaj interŝanĝoj.

Ariadna Gutierrez

## Telegrame

Septembre al la Telegrama kanalo *Esperanto-novaĵoj* (https://t.me/esperanto_news) aliĝis 426 abonantoj. Ĝi nun estas la dua plej abonata Esperanta kanalo en Telegramo. Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri Esperanto kaj esperantista agado, aliĝu al la kanalo *Esperanto-novaĵoj*. Legu pli ĉe
https://sezonoj.ru/2024/09/telegramo-2/

## La Unua Bulteno por Brno neglektas fervojan alvenon!

En la retejo de UEA aperis la unua bulteno kaj reta aliĝilo de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ekde la 19-a de julio 2025 en Brno (Ĉeĥio). Elŝutu la unuan bultenon kaj pripensu vian aliĝon al la kongreso — https://sezonoj.ru/2024/08/brno-2/. ***SMG:*** Tiu Bulteno ne emfazas la eblon vojaĝi al Brno el grandaj partoj de Eŭropo per komfortaj trajnoj (aŭ malpli komfortaj sed pli sanigaj bicikloj)

========= vortoj: 1150 =========

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
ilei IKEF
Universalaneo, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, kaj aliaj/

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.